



**PILO-PRESS** legantoj  
Internacia abonantoj  
Informservo amikoj !

**Eldonanto/Herausgeber:**

Ludwig Pickel  
Postfach 2113  
D-85 Nürnberg 1  
Tel. (0911) 46 36 49; 5142 69

N-ro 50/76 - 28 dec 1976  
Aperas ĉiusemajne

Balono Esperanto HB-BEO baptita kaj inaŭgurita

Zürich (pp/wa) - Sabate, la 18-an de decembro 1976. Zürich dronis en malseka nebulo, estis grizega mondo! La moderna Forchtrajno kondukis nin supren, lumen al sunbrilo kaj multe da nego. Saniga promendado duonhora tra bela arbaro, ĝis Vorder-Guldenen, al impresa gastejo Waldhaus.



La balono Esperanto HB-BEO: Ĝi estis konstruita en USONO, ĝia enhavo estas 1600 m<sup>3</sup>, la diametro 15 m, la alteco 18 m, ĝi estas el nilono miksitita kun Polyuretano, nebruligebla. (Foto: Ruedi Baumann el Tagblatt der Stadt Zürich, 20.12.76)

Surprizataj pri la ĉarma regiono inter 40 kaj 50 esperantistoj venis por vidi la eksterordinaran spektaklon, bapton kaj inaŭguron de la balono Esperanto.

En la restoracio s-ro Fritz Liechti, prezidanto de Esperanto-Societo Zürich, bonvenigis la gastojn kaj transdonis interesajn klarigojn. La klopodoj por akiro de la balono kaj la financado per speciala filatela koverto signifis unu kaj duonan jarojn de streĉa laboro. En julio 1976 la balono estis mendita, en oktobro liverita. Sed malbonŝance dum la transporto ĝi ie perdiĝis, tamen en novembro tro-

vis la ĝustan lokon. La poŝtflugo okazis la 14-an de decembro. Ĉe belega suna vetero HB-BEO leviĝis por alteriĝi ĉe la historia urbeto Grüningen, kiel montras la bela, zorge farita poŝta stampo sur la bela filatela koverto, de kiu estis preparitaj 2 500 ekzempleroj kaj jam venditaj 2000.

S-ro Liechti prezentis al la kunvenintoj la simpatian iniciatinton, la piloton Bruno Rohr, kiu intertempe simpatiis kun Esperanto kaj ĝin lernos. S-ro Rohr donis kelkajn teknikajn klarigojn (Vidu la tekston sub la foto!).

Nun venis la momento iri eksteren por rigardi kio okazu. El aŭtomobilo estis prenita la korbo, el plastika materialo, kun instrumentoj kaj gasboteloj. Estis elpakita la balono, elstrekita kaj tiam per ventilatoro enblovita malvarma aero kaj jam ĝi ekstaris, montris sian formon kaj ekaperis la surskribo ESPERANTO. Tiam la hejtigilo estis ekfunkciigita kaj la balono tute plenigita.

S-ino Hanni Liechti plenumis kiel baptonklinio la bapton ceremonion. En ĉeesto de s-roj Liechti kaj Rohr ŝi diris la por tia okazo tradiciajn vortojn kaj per ĉampano bone malsekigis la balonkorbon. Post "envago-

### Balono... (daŭrigò)

niĝo" s-ino Liechti kaj la piloto, s-ro Rohr, leviĝis por la unua flugo de la baptita HB-BEO. Majeste la balono leviĝis kaj centoj da rigardantoj mansvingis. Post 10 minutoj la balono denove alteriĝis kaj supreniris s-ro Liechti. Ĉiam sub gvido de la piloto tuta aro da esperantistoj ĝuis leviĝon kaj rigardon de supre, al belaj arbaroj kaj montoj, sub blua ĉielo.....

Korĝojiga estis tiu travivaĵo. Estonte la balono varbos ankaŭ por Esperanto, dank' al la celkonscia agado nelacigebla de gesinjoroj H. kaj F. Liechti kaj la piloto. Al ili koran dankon!

(Pilo-Press dankas al s-ro Otto Walder pro la sendita raporto kaj al s-ro Walter Sonderegger pro senditaj gazetteltranĉaĵoj kun foto kaj la speciala filatela koverto kun la stampo de la historia urbeto Grünigen).

### Kiel atingi Islandon?

Rotterdam (pp) - Ĵus aperis la 3-a numero de la Oficiala Komunikado pri la 62-a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko 1977.

Laŭ la komunikado en decembro la nombro de kongresanoj proksimiĝas al 550. La plej kongresema lando estas Francio kun 78 aliĝintoj, sekvata de Federacia Respubliko Germanujo kun 54, Nederlando kun 44, Svedujo kun 39, Britujo kun 29. El Islando mem aliĝis ĝis nun 27 personoj.

### Pri vojaĝeblecoj

La kongresanoj havos la eblecon mendi la alflugon pere de la Kongreso mem aŭ pere de la landa kongresperanto. Por pluraj landoj la Kongreso mem aranĝos karavanojn; por tiuj landoj, por kiuj karavanoj jam estas organizitaj, la mendiloj estos transsenditaj al la koncerna organizanto. UEA devis rezigni pri la ideo organizi ĉartoflugojn ekde Parizo aŭ Amsterdam, kio signifas, ke la kongresanoj el la eŭropa kontinento ekflugos al Islando ekde Disseldorf, Frankfurt aŭ Luksemburgo. Prezoj (ankoraŭ konfirmotaj) estos respektive DM 625,-; DM 683,-; kaj el Luksemburgo 987 francaj frankoj aŭ ĉ. 493,- gld. Ĝenerale necesos alflugi grupe en fiksitaj datoj (tuj antaŭ la UK), sed ĉiu povas libere elekti sian revendaton.

### Loĝkostoj nun konataj

Hoteloj tuj apud la kongresejo aŭ kun bona aŭtobusa ligo: Prezoj en dupersona ĉambro, sen matenmanĝo, por ĉiu persono kaj nokto de 49 ĝis 56 guldenoj.

Studenta hotelo; tuj apud la kongresejo: En dupersonaj ĉambroj po 32,50 gld., sen matenmanĝo, por ĉiu persono kaj nokto.

Gastejoj kaj pensionoj. Estas rezervitaj ĉ. 200 litoj en la kvartalo de la kongresejo. Prezo po 32,50 gld. por ĉiu persono kaj nokto en dupersona ĉambro, inkluzive matenmanĝon; 45,- gld. por unupersona ĉambro.

Amasloĝejoj, aranĝataj en lernejoj, prezo ĉ. 7,50 gld. por ĉiu persono kaj nokto, sen matenmanĝo.

Ankaŭ tendumantoj bonvenaj. Kvankam en Islando nur 3-4 veraj tendumejoj ekipitaj per necesoj, fluanta akvo ktp. ekzistas, unu tia ekzistas en Rejkjaviko kaj estos do uzebla por kongresanoj. Oni skribu al Ferðafélag Islands, Öldugata 3, Rejkjaviko.

Ekskursoj. Islando estas lando de sovaĝa naturo, kun grandaj vastejoj neloĝataj, aktivaj vulkanoj, gejseroj kaj aliaj spektaklaj naturfenomenoj. LKK decidis proponi al la kongresanoj tri duontagajn ekskursojn, tri samtempajn tuttagajn ekskursojn kaj tri postkongresajn ekskursojn.

## 9-a Esperanto-Konsultiĝo en Moskvo

Moskvo (pp) - Laŭ informo de Pola Radio dum la Esperanto-Ekspreso, dimanĉe, la 26-an de decembro, en la ĉefurbo de Sovetunio okazis de la 23-a ĝis la 28-a de decembro la 9-a Konsultiĝo de reprezentantoj de Esperanto-asocioj kaj -organizaĵoj en eŭropaj socialismaj landoj. Partoprenis ĝin reprezentantoj de Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetunio.

La ĉefa temo de la konsultiĝo estis la aktualaj taskoj por kunlaborado de esperantistoj lige kun la jubileo de 60-a datreveno de la "granda oktobra socialisma revolucio". La prezentitaj referaĵoj koncernis i.a. la internacian situacion kaj agadojn por la realigo de la decidoj de la finaj aktoj de la Helsinkia konferenco, la lasttempaj atingoj de esperantistoj en la fako Esperantologio kaj interŝanĝo de opinioj pri kunlaboro de Esperanto-organizaĵoj.

Kadre de la 9-a Konsultiĝo okazis renkontiĝo kun Moskvaj esperantistoj en la Domo de Amikeco. La restado en la ĉefurbo lasis laŭ la raporto de Pola Radio neforgeseblajn impresojn ĉe la eksterlandaj esperantistoj venintaj por la 9-a Konsultiĝo, kiun organizis Esperanto-Komisiono de la Tutsoveta Asocio de Amikeco-Societoj kun Eksterlando.

## Pri la lingva situacio en Sovetunio

### Eldiro de d-ro Magomet I. Isaev

Moskvo/Varsovio (pp) - Reportero de Pola Radio intervjuis en Moskvo la konatan esperantologon sovetan, d-ron Magomet I. Isaev, prezidanto de la Komisiono por Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj. D-ro Isaev faris jenan eldiron:

"Karaj polaj gekamaradoj kaj geamikoj, permesu al mi saluti vin en la nomo de la Unio de Sovetaj Societoj por la Kulturaj Rilatoj kun Eksterlandaj Popoloj. Ĉiuj sovetaĵ esperantistoj transdonas al vi korajn salutojn kaj bondezirojn. Karaj gesamideanoj, vi scias ke Esperantomovado en ĉiu lando disvolviĝas en specifaj cirkonstancoj; ĝi dependas de diversaj historiaj kaj sociaj faktoroj, la plej grava el tiuj estas la lingva situacio.

Kiel vi scias, Soveta Unio estas unu el la plej multnaciaj ŝtatoj de la mondo. Sur ĝiaj grandegaj areoj loĝas pli ol 130 popoloj, ili havas siajn proprajn lingvojn, kiuj apartenas al diversaj lingvofamilioj. Dum carismo nur 20 popoloj havis propran alfabeton. Sed post oktobra revolucio sciencistoj konstruis ankoraŭ 50 novajn alfabetojn. Nun multnombraj naciaj lingvoj sukcesis en siaj evoluoj.

Tamen ĉiu multnacia ŝtato bezonas ankaŭ ankoraŭ komunan lingvon. Pro tio unu el la egalrajtaj sovetaĵ lingvoj, la rusa, estis elektita kiel interpopola lingvo. Por tio ekzistas objektivaj historiaj kaŭzoj: 1) La rusoj nombras ĉ. 55 % de la loĝantaro de USSR, 2) Rusoj loĝas en ĉiuj regionoj de la lando, 3) En revolucia kaj kultura movado reprezentantoj de la rusoj okupis avangardan pozicion.

Tamen la lingvo de interpopolaj kontaktoj tute ne egalas al ŝtata lingvo. Kiel oni scias, ŝtata lingvo ekz. angla, franca, japana estas deviga, dum la interpopola lingvo ĵure havas neniujn avantaĝojn antaŭ alia lingvo. Ĉiu civitano rajtas apliki sin al ajna institucio en sia gepatra lingvo aŭ en alia lingvo por li la plej oportuna. Sekve la ĝenerala linio de la lingva situacio en nia lando devas esti karakterizita kiel plilingvisma. Krome kompreneble sovetaĵ homoj studas ankaŭ fremdajn lingvojn, germanan, polan, anglan, francan, hispanan, araban...Lige kun tio antaŭ sovetaĵ sciencistoj staras multnombraj problemoj.

Tamen lastajn dek, dekkvin jarojn niaj sciencistoj aktivigas ankaŭ siajn interlingvistikajn esplorojn. Kiel vi scias en la kadro de Centra Lingvosciencia Instituto funkcias speciala problemo-grupo, kiu esploras sciencajn kaj praktikajn demandojn de Interracia Lingvo Esperanto. La scienca laboro laŭ nia opinio estas tre grava por plua disvolviĝo de Esperanto-movado.

Sovetaj esperantistoj sentas sin kiel ero de esperantistaro en socialismaj landoj. Pro tio la sukcesoj de ĉiu de nia taĉmentoj estas sukcesoj ankaŭ niaj propraj. Mi scias ke esperantistoj de Pollando estas unu el la plej aktivaj kaj fruktoĉonaj taĉmentoj inter socialisma esperantistaro.

Permesu ankoraŭfoje deziri al vi novajn grandajn sukcesojn en via porpaca kaj poramikeca agado. Ĉiujn bonojn!"

(La supra eldiro estis disaŭdigita de Pola Radio kadre de la Esperanto-Ekspreso de la 26/27 dec.)

\*\*\*\*\*

### Dankon pro kunlaboro

Al ĉiuj esperantistoj en la tuta mondo Pilo-Press kore dankas pro regula alsendo de informoj.

Dankon ankaŭ al redaktoroj de Esperanto-gazetoj kaj Radio-stacioj kiuj utiligas informojn el Pilo-Press.

Daŭru la kunlaboro ankaŭ dum 1977!

### Rekordo en Ilustrowany Kurier Polski

La pola ĵurnalo "Ilustrowany Kurier Polski" publikigis dum 1976 pli ol 50 informoj pri Esperanto kaj la Esperanto-vivo en Federacia Respubliko Germanujo tradukita el Pilo-Press de K. Małycha, Bydgoszcz.

Informoj el Pilo-Press aperis ankaŭ en "Głos Olsztynski" tradukita de redaktoro Z. Jałowicki, Olsztyn, kaj en "dziennik wieczorny", Bydgoszcz, kadre la Esperanto-rubriko "Esperanto dziś" (Esperanto hodiaŭ), kiun prizorgas R.W. Rutkowski.

R.W. Rutkowski skribis ĵus: "Mi elkore dankas por via regula sendado de tre interesaj bultenoj "PILO-PRESS Internacia Informservo". Ili estas por mi en la informagado pollingva vere valora fonto de la plej aktualaĵ informoj. Sufiĉe ofte mi utiligas ilin en la rubriko "Esperanto dziś" (Esperanto hodiaŭ) kiun mi redaktas de sept. 1970 en la populara posttagmeza ĵurnalo "Dziennik Wieczorny" (Vespera Ĵurnalo)..... La relative forta E-movado en nia regiono estas parte kaŭzita pro regula gazetara informado. Ĉefan rolon ludas evidente preskaŭ ĉiutagaj informoj de "Ilustrowany Kurier Polski" fare de red. Yazimierz Małycha, sed ankaŭ nia gazeto havas iom da meritoj."

### Andrzej Pettyn, redaktoro de Pola Radio

transdonas al ĉiuj legantoj de Pilo-Press korajn salutojn kaj multajn novjarajn bondezirojn!

\*\*\*\*\*

### En propra afero

Ĉi tiu numero estas la lasta de la jaro 1976. La unua numero de la jaro 1977 aperos la 3-an de januaro. Mi dankas al ĉiuj abonantoj kaj amikoj, kiuj subtenis min. Mi petas ankaŭ por via subteno en la venonta jaro kaj invitas vin por abono 1977. La abonprezo jara estas kiel antaŭe 30,- GM por la E-eldono. Pagoj al: Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851 aŭ Stadtparkasse Nürnberg 1.901.579.

Ĉion bonan por la nova jaro!

*Ludwig Pickel*